


NORDFRANCA

ESPERANTISTO

(PIKARDA STELO - NORDA GAZETO - ANTAŬEN)



MONATA REVUO

de la Nordfrancaj Esperantistoj

Publikigas la sciigojn

de la Norda Federacio kaj de la Grupoj

REVUE MENSUELLE

des Espérantistes du Nord de la France

Publie les renseignements

de la Fédération du Nord et des Groupes



Redaktejo kaj administrado :

18, rue Albert I^{er} - DUNKERQUE (Nord)

C. VERNAY, Direktoro-Prirespondanto

G. VANHOVE, Administranto

Redakta Komitato, redaktas

Jarabono : Francujo 10 frankoj

aliaj landoj : 8 respondkuponoj aŭ egalvaloro

POSTĈEKKONTO : LILLE 403-50

C. VERNAY, DUNKERQUE

Nia libro-fako

Por helpi NjE-on ĉiuj aĉetu niajn sekvantajn eldonojn vendataj je la profito de nia revuo :

APERÇU SUR L'ÉVOLUTION DE L'IDÉE DE LA LANGUE AUXILIAIRE, de M. C. Vernay. — *Langues et dialectes dans le monde.* — *L'idée de la langue auxiliaire.* — *Les divers projets.* — *Classification des systèmes.* — *Le Volapük et sa structure.* — *Zamenhof, l'Esperanto et le mouvement espérantiste.* — *Vocabulaire, structure et grammaire de l'Esperanto.* — *Naissance et développement du mouvement espérantiste en France, dans la région du Nord et à Dunkerque.*

Préface de M^e Degand, Avocat, Docteur en droit, Président du Groupe de Dunkerque et de la Fédération Espérantiste du Nord de la France. (12 clichés) 10,00

VALENTIN-EMILE MANNEVY, HEROO KAJ APOSTOLO, de Vernay kaj Delcourt. — 16 paĝa kaj klišo, sur bonega papero 4,00

Niaj poŝkartoj : "AH ! S'ILS SAVAIENT L'ESPERANTO", desegno de Armangeol (sur beau carton toilé bleu). — Texte français ou esperanto, la douzaine 3,60

HISTOIRE DE LA FÉDÉRATION ESPÉRANTISTE DU NORD, par E. Deligny. — 32 paĝa 3,00

ONI LIKVIDAS :

APERÇU SUR L'ÉVOLUTION DE L'IDÉE DE LA LANGUE AUXILIAIRE	10,00
VALENTIN-EMILE MANNEVY, HEROO KAJ APOSTOLO	4,00
NIAJ POŜKARTOJ : "AH ! S'ILS SAVAIENT L'ESPERANTO"	3,60
HISTOIRE DE LA FÉDÉRATION ESPÉRANTISTE DU NORD	3,00

Sin turni al Vernay, 18, rue Albert-1^{er}, à Dunkerque (Nord). Pago per poŝtmarkoj aŭ ĉe poŝtebanko 40350 Lille.

NORDFRANCA ESPERANTISTO

Monata Revuo de la Nordfrancaj Esperantistoj

2a Serio - 16a Jaro

Noj 6-7

APRILIO-MAJO 1939

20^e CONGRÈS FÉDÉRAL D'ESPERANTO

FRESNES-SUR-ESCAUT, 6 ET 7 MAI 1939

ĈU VI JAM ALIĜIS ?



Lieutenant Mannevy (n. 1877) (Paris) g. 1939

Valentin-Emile MANNEVY

Taj vivoj estas tiom riĉaj je eventoj kaj aventuroj, ke estas tute facile priordigi biografion: sufiĉas nur klasifiki la faktojn laŭ la datoj. Sed aliaj estas multe pli malfacile priskribeblaj, pro tio, ke, en ili, eksterordinaraj okazaĵoj ne abundas. Tamen, ŝajnas al ni, ke valoras ankaŭ priludi vivon, kies ĉefaj ecoj estis: humila plenumado de la destinita tasko, klopodoj kaj fervoro por realigi noblan idealon, ĉiam preta servemo al aliuloj, gajeco malgraŭ la malfavoroj de la sorto, entute simpleco kaj memkontento. Bedaŭrinde, antaŭ tia tasko, oni volonte rezignus: la sentata admiro emigas al silenta pripensado. Malmultaj sentoj estas ja tiom penige esprimeblaj, kiom admirado.

Tiamaniere okazas, ke nur en kelkaj koroj, postvivis la memoro pri tiuj, kiuj simile agis senbrue. Ŝajnas ke oni preskaŭ ofendus tiujn homojn se oni volas fanfaroni pri iliaj meritoj.

Tamen la junaj generacioj bezonas iafaje instigon per belaj ekzemploj; estas necese montri al ili, ke, sur la jam irita vojo de nia ideala Esperanto-movado multaj tiaj homoj jam kuraĝe marŝis al la celo. Jen kial, ni, tro forgesemaj, devas, de tempo al tempo, rigardi malantaŭen, por ĉerpi pli da fido pri la nepra triumfo de nia afero.

La mallonga vivo de Leŭtenanto Mannevy estas unu el tiuj cilindraj ekzemploj, pri kiuj tro multaj ne scias. Vane oni serĉus la nomon de Mannevy en "Enciklopedio de Esperanto". Verŝajne la admirinda vivo de tiu nobla pioniro de nia movado estis tro plena de tradiciaj virtoj por trovi lokon en tiu libro. Nuntempe, restas nur kelkaj, kiuj efektive lin konis, kaj ankoraŭ lian memoron vivas nur en la koro de lia vidvino, de liaj malnovaj amikoj kaj de kelkaj Esperantistoj, kiuj lin admiras.

* * *

En vilaĝo de Centra Francujo, Corvol l'Orgueilleux, (departemento Nièvre) la 2-an de Decembro 1882, naskiĝis Valentin Emile Mannevy.

Kiam la juna knabo ekiris al la lernejo, li rapide distingigis inter siaj kamaradoj pro rimarkinda inteligenteco. La Corvola Paroĥestro, Abato Roumier, (nuntempe kononiko en Nevers) decidis speciale interesiĝi pri tiu knabo, kiu montris tiom da bonaj ecoj. Li prenis sur sin la gvidadon de la junulo tra la sciencvojoj

kaj instruis al li la grekan kaj latinan lingvojn, diligente studitaj de la lernanto.

Poste, en la gimnazio de Clamecy, Mannevy studis retorikon. Ne ankoraŭ 16-jara, li devis ricevi specialan permeson pro frua aĝo por provi la abiturientan ekzamenon. Sukcesinte akiri la diplomon, li fariĝis abituriento pri beletristiko en Julio 1898-a. Post plua dujara memlernado, li denove sukcesis, dum Oktobro 1900-a kaj fariĝis abituriento pri sciencoj kaj matematikoj.

Pro lia arda temperamento, li decidis elekti la soldatan karieron. Je la fino de la sama jaro, li memvole soldatiĝis por kvar jaroj en la 2-a regimento de Algeriaj Pafistoj. Soldato dum unu jaro, li fariĝis kaporalo en Oktobro 1901, furiero en Aprilo 1903 kaj serĝento en Marto 1904-a. Jen en Algerio, jen en Sahara-regionoj, li partoprenis sep militirojn, la batalon kaj bombardon de Figuig kaj li grave servis por la pacigado de Orana Sudo. Dum la unuaj jaroj de sia militservo, li diligente lernis la araban lingvon: lia perfekta scipovo de tiu lingvo multe helpis al li kaj al nia agado en Afriko. La 8-an de Junio 1903-a, la sub-oficiro Mannevy ricevis la kolonian Medalon.

* * *

Eble, la Esperantistoj ŝatus pli speciale ekscii pri la rilanta al Esperanto parto de la vivo de Leŭtenanto Mannevy. Sed, pro la intima kunligo de la soldata kaj esperanto vivoj, estas tute neeble apartigi ilin. Por bone kompreni ĉion, kion li faris en diversaj lokoj por nia afero, la du flankoj de lia vivo devas esti pritraktataj samtempe.

La Esperantistigo de Mannevy estas ŝuldata, ne senpere, al Carlo Bourlet. Oni bone konas la aĝemon kaj entreprenemon de tiu lasta: post longaj klopodoj, li sukcesis enpresigi dupaĝan tekston pri Esperanto en la 1902-a eldonon de la tre konata "Almanako Hachette". Dum ripoza tempo, en la dezerto, kaj tute laŭhazarde, Mannevy ekvidis en la Almanako la tekston de Carlo Bourlet. Tuj interesigita, la leganto petis alsendon de esperanta gramatiko, kiun li studis atente. De tiam, Mannevy fariĝis arda apostolo de Esperanto: li interrilatigis kun Carlo Bourlet, Cart. de Beaufront, Archdeacon, tiamaĵ pioniroj de la helpa lingvo.

(Bonvolu legi selekon en la broŝuro ĵus eldonita de "Nord-franca Esperantisto" kaj titolita: "Valentin-Emile Mannevy, heroo kaj apostolo". Tiu ĉi broŝuro, 16 paĝa plus la portreto de Mannevy, estas vendata je la profito de nia revuo. Ni esperas ke ĉiuj niaj samideanoj bonvolos ĝin aĉeti kaj tiel helpi NFE. Prezo 4 f. fr. Oni povas pagi per poŝtmarkoj aŭ al poŝtĉekkonto 403.50 Lille. Sin turni al Vernay, 18, rue Albert-1^{er}, Dunkerque.)

LA RED.

20^{ma} CONGRÈS FÉDÉRAL (FRESNES-SUR-ESCAUT)
de la Fédération Espérantiste du Nord de la France

ALIGANTOJ AL LA KONGRESO

4a LISTO

- | | |
|-------------------------------------|-------------------------------|
| Gesinjoroj : | Gesinjoroj : |
| 128 Bröcker Henri, Vieux-Condé. | 149 S-ino Varey, Coudekerque. |
| 129 Houplain Marcel, Achicourt. | 150 Bros Marion, Lens. |
| 130 Doktoro Desmoulin, Douai. | 151 Joye Arthur, Lens. |
| 131 F-ino Bronislava Sinda, Vx-Cdé. | 152 Erjavec Raphaël, Lens. |
| 132 F-ino Henriette Sinda, Vx-Cdé. | 153 Platel Abel, Lens. |
| 133 Delbecq Achille, Fresnes-s/E. | 154 F-ino Pocquet Y., Lens. |
| 134 Rampanaux S-ino, Jeumont. | 155 F-ino Vausoué, L., Lens. |
| 135 Mauran F-ino, Jeumont. | 156 F-ino Vausoué, R., Lens. |
| 136 Vatbled F-ino, Jeumont. | 157 F-ino Descamps V., Lens. |
| 137 Pluchard S-ro, Jeumont. | 158 Muselte, Lens. |
| 138 Dovergne, Jeumont. | 159 F-ino Flahaut G., Lens. |
| 139 Lorget S-ro, Jeumont. | 160 Cordier Gilbert, Lens. |
| 140 Lecat S-ro Jeumont. | 161 F-ino Depuis R., Lens. |
| 141 Bertaux S-ro, Boussois. | 162 F-ino Delvaux G., Lens. |
| 142 Bertaux S-ino, Boussois. | 163 S-ro Devaux E., Lens. |
| 143 Marchand F-ino, Boussois. | 164 Vala Claude, Lens. |
| 144 Guelle F-ino, Boussois. | 165 S-ino Vala, Lens. |
| 145 Matto F-ino, Boussois. | 166 S-ino G. Carlier, Lens. |
| 146 Fourmoy S-ro Recquignies. | 167 F-ino Brévière, Marpent. |
| 147 Fourmoy S-ino Recquignies. | 168 S-ino Marchand, Boussois. |
| 148 Morsa S-ro, Boussois. | 169 S-ro Marchand, Boussois. |

(à suivre.)

Listo de Grupoj laŭ la nombro :

Jeumont 24	Douai 6	Saint-Omer 2
Lens 21	Paris 5	Desvres 2
Avesnes 16	Amiens 4	Hazebrouck 2
Dunkerque 14	Anzin 2	Fresnes-sur-Escaut 40
Arras 9	Valenciennes 2	Belgique 3
Lille 8	Boulogne 2	Suisse 1

Laŭ tiu ĉi listo oni povas opini ke la samideanaro kiu loĝas en la plej malvarma regiono de la Nord-Franca Esperantujo estas la plej varma por aliĝi. Kuraĝu, Boulogne, Saint-Omer, Amiens, Douai, Lille, Arras, kaj Dunkerque. Ĉu estas kutimo ke la malplej imponaj grupoj devu montri ekzemplon ?

Noto. — Por veturi al la Kongreso de Fresnes per la fervojo, oni veturas fervoĵe ĝis la stacidomo de Valenciennes; de tie oni veturas al Fresnes per tramveturilo kaj post duonhora oni estas en Fresnes ĉe la Kongreso. Estas tramveturilo ĉiu kvaronhora.

Lasta alvoko favore nian kongreson

Baldaŭ, la 7an kaj 7an de majo la urbo Fresnes-sur-Escaut festos, ĉar en tiu urbo okazos la 20a Nordfranca Esperantista Kongreso.

Pro tio la loka Grupo "Mannevy" alvokas varme ĉiujn geesperantistojn kaj invitas ilin partopreni tiun kongreson.

Venu multnombraj en Fresnes ĉar via ĉeesto estas necesa ne nur pri la sukceso de la kongreso sed ankaŭ kaj precipe pro la triumfo de la esperantista lingvo. Venu ! Ni rezervas al vi la plej koran akcepton.

Bonvolu sendi tuj vian aliĝon al S-ro Ninauve, Groupe Esperantiste, Condé-Fresnes-sur-Escaut (Nord) (5 frankoj antaŭ la 20a de aprilo, poste 10 f.) Poŝtĉekkonto 588-05 Lille.

Por la Komitato de la Esperantista Grupo "Mannevy" en Fresnes-sur-Escaut,

La Prezidanto : E. NINAUVE.

20^a Nordfederacia kongreso

PROGRAMME

SAMEDI 6 MAI.

- 15 heures. — Examens de la S.F.P.E. (Hôtel de Ville).
- Après les examens : dépôt d'une gerbe de fleurs sur la tombe du lieutenant Mannevy, fondateur du Groupe local et pionnier de l'Esperanto dans la région de Condé.
- Visite du musée de Condé.
- 20 h. 30. — Soirée amicale. Sauterie, tours de chant, buffet froid (Salle des Fêtes).

DIMANCHE 7 MAI.

- De 8 heures à 9 h.30. — Réception des Congressistes.
- 9 heures. — Concours Fervorigilo (Hôtel de Ville).
- 10 heures. — Assemblée Générale (Salle des Fêtes).
- 12 heures. — Réception à l'Hôtel de Ville.
- 13 h. 30. — Photographie générale.
- 13 h. 45. — Défilé au monument aux morts de la Guerre.
- 13 heures. — Inauguration de la Rue Zamenhof.
- 14 heures. — Banquet Officiel.
- 16 h. 30. — Matinée Récréative (Salle des Fêtes).
- Après la Matinée Récréative : Grande Kermesse sur les deux places de la ville.



Nia fervora samideano, S-ro JULES DELACOURT, kiu estis enoficigita kiel Direktoro de la Administraj Oficoj de la Komerca Cambro en Dunkerque.

Konstanta subteno

4a LISTO

Tutkoran dankon al la ĉi postaj gosanideanoj kiuj bone komprenas la egajn malfacilaĵojn kiujn ni havas por daŭrigi la aperadon de nia revuo en malfacilaj cirkonstancoj. Por ke ni povu elteni firme helpu nin ! Dankon.

S-ro Brunet en Arras	10,00
S-ro Mariez en Drusenheim	5,00
S-ro G. Perrin en Calais	25,00
S-ro Ballenghien en Bachy	10,00
S-ro Houzé en Dunkerque	50,00
Ge-Vanhersecke en Condekerque	25,00
Varma amiko de N/E en St-Pol-sur-Mer	20,00
Varma amiko de N/E en Lens	50,00
S-ro Ch. Aucerne en Lille, bileto N° 0380516 de la Nacia Loterio (bedaŭrinde ĝi ne gajnis)	

Entute

195,00

Nia amiko, S-ro Flageul, kiu devis ĉesi la eldonadon de "Fluganta Skribilo" skribas al ni :

« Same kiel mi ĉagreniĝis pri la necbleco daŭrigi mian propagandon, same mi bedaŭras pro via timo pri ebla malapero de N/E. Tio pravas nesufiĉan intereson de la homoj por la internacia lingvo. Kiam mi proponas, ke ili dediĉu kelkajn monatojn por lernado kaj kelkajn frankojn por helpado al paciga afero, ili ne povas tion konsenti... sed ili estas pretaj por multe elspezi, multe labori, multe suferi... kaj eĉ morti, por obliĝi teruregan hombrucadon !... »

La retoromanĉa lingvo

(2a artikolo)

GIACHEN MICHEL NAY (1860-1920)

La bovino pugnera

« "Pugnera" estas la epiteto de la ĉefa bovino, t. e. la bovino, « kiu venkante la aliajn, sukcesas meti sin en la unuan lokon de « la brutaro. — Sur la alpo, kie la sekvonta rakonto okazas, depost « dektri jaroj "la Crutscha" (t. e. la kurbkornulino) de la kampulo « Gion, estis pugnero. La kampulo Toni dumvintre aĉetis en alia « lokoj fortegan bovinon "la Nera" (t. e. la nigrulino) esperante ke « ŝi venkos la Crutscha'n kaj fariĝos pugnero. — Nun estas la unua « tago sur la alpo. »

(rim. de la trad.)

Proksimiĝis la vespero kaj la kampuloj jam senpacientiĝis kaj kriis deziris, ke oni pelu la bovaron al la stalo, ĉar estas nepre tempo, se oni ankoraŭ dumtage volas iri hejmen.

La paŝtistoj irigis la bovinon al la placo, kie la pugneroj kutime devis renkontiĝi. Tuŝi la Crutscha'n neniu ĵu bovinon riskis; tiu kunulino

estis tro bone konata. La Nera, kiel fremda bovino, estis atakata de pluraĵ, sed ŝi puŝis kaj pelis ilin for, kvazaŭ ili estus nur katoj.

Post mallonga vojero la du ĉefaj pugneroj estis interpuŝiĝontaj. La homoj formis cirkolon, oni ne plu aŭdis babiladon kaj ĉiuj atendis scieme la batalon, kiu estis sekvonta.

Toni sidis sur ŝtono; li estis tute flava kiel malnova butero, kaj en siajn tremantajn manojn li metis sian kapon, kiu ĝuste en tiu momento pezis du funtojn pli. Vid-al-vide Gion staris. Li apogis sin sur sia ferumita bastono kaj rigardis ĉirkaŭen kvazaŭ li devus atendi la lastan juĝadon. Lia sulka vizaĝo estis tute ŝanĝiĝinta. Per siaj du tranĉdentoj, postrestaĵo el pli bonaj jaroj, kiujn li ankoraŭ havis en sia buŝo, li tenis sian pipon kun tubo el evonimo, mordante kaj maĉante ĝin kvazaŭ ĝi estus kolbaso. La Crutscha alveninte sur sia malnova kutima placo komencis skrapi la teron kaj muĝi kvazaŭ vera taŭro. La Nera ne modeste komencis ankaŭ igi sin rimarkata vidante la koleran konduton de sia kontraŭulino.

Skrapadoj, ke tero kaj ŝtonoj flugis tra la aero! La Nera elpendigis la langon kaj rulis la okulojn, kvazaŭ ŝi estus ebria. La Crutscha, la kapon en la aero, blovspregis. Ĉio estis kvietita, tiel ke oni povus aŭdi pulon salti. Unu momenton kaj la Crutscha mallevinte la kapon kaj preminte la voston inter la piedojn, ektuŝas la Nera'n. Toni eksaltis kiel malesperanto fleksante siajn kurbaĵajn gambojn kaj etendante la brakojn kvazaŭ li volus rapoti kaj helpi al sia Nera. Gion lasis fali sian pipon klinante sian lignoblokan kapon preskaŭ ĝis la tero, kvazaŭ ankaŭ li volus helpi al la Crutscha por doni puŝatojn.

Dume laboris la du pugneroj mirinde; la kampuloj estis tute ekscititaj; unu helpis per deziroj kaj gestoj al la Crutscha alia al la Nera; iliaj okuloj sekvis ĉiujn movojn kaj turniĝojn. Frapoj, kappuŝoj, falegoj, turnsaltoj alternis kaj estis danĝero, ke unu aŭ alia, kiu estis tro proksima, estus piede dispremata. La Crutscha estis puŝinta la Nera'n sur la brusto provante tiel turni kaj faligi ŝin. Vane! Malgraŭ ĉiuj klopodoj la Nera rezistis. Subite la Crutscha lasis ŝin kaj atakis sian malamikinon sur la kapo provante atingi per sia malsupra korno la tempion, Neeble! La kraŭo de la Nera estis tiel larĝa, ke ankaŭ tio neniel helpis. La maljuna bovino bone laboris per sia kurba korno sur la buŝego de la Nera, tiel ke ĝi estis tute sangumita kaj aspektis kiel raspilo. Sed ne por nenio. La Nera igis per tio pli kaj pli ekscitita kaj furioza. Unu salton malantaŭen, unu puŝegon kaj la Crutscha estis surgenua. Ŝi ja levigis tuj kiel sago, sed la Nera en sia kolero ne lasis al ŝi tempon prepariĝi. Per dua terura frapo ŝi denove faligis la maljunulinon. La Crutscha cedis — la unuan fojon en sia vivo. — Tute taŭzita ŝi iris tremante kaj spiregante sur monteton kaj de tie rigardis kun teruritaj okuloj malsupren al la Nera. Tiu, kiel nobla pugnero, tute ne postkuris la rivalinon, kiel faras la fibovinoj, sed ŝi restis sur sia loko, fiera, sed tamen kvazaŭ ŝi volus diri: « Kun vi, maljunulino, ne estas bone interrilati. » Tiu rezulto liberigis la langon al la kampuloj. Unu gratulis al Toni, alia kondolencis al Gion; unu laŭdis la Nera'n, alia bedaŭris la Crutscha'n trovante, ke ŝi estus devinta venki, ĉar ŝi batalas multe pli bone ol la alia.

Dum la homoj diskutis kaj disputis, aŭdigis nova obtuza bato. Per unu salto la Crutscha estis malsupreniĝinta de sia monteto kaj atakis la Nera'n denove. Tiun fojon estis ankoraŭ pli malfacile kaj serioze. La Nera komencis jam levi la dorson kaj fleksi la krurojn; ĉiuj kredis, ke ŝi estas perdita; tiam ŝi subite faris novan puŝegon pelante la Crutscha'n duan fojon de tie. Tiu turniĝado kaj interbatalado daŭris la tutan ves-

peron; dum la nokto la servantaro devis leviĝi, timante, ke la pugneroj frakasos la kabanon, ĉar ili interpuŝiĝis ĝuste antaŭ la pordo. La Crutscha ne volis malvenki.

Fine, vidante, ke ŝi ne povis venki, ŝi foriris de la stalo kaj retiriĝis malantaŭ rokaĵo kie la paŝtistoj post longa serĉado trovis ŝin lezita kaj kaŝita en la alnoarbustaĵo. Malrapide ili sukcesis konduki ŝin al la ŝirmejo, sed la kolerigita kaj ofendita besto ne levis la kapon. Estis jam la kvara tago, sen ke la mizera bovino tuŝis herbon; eĉ salon, por kiu ŝi alie montriĝis tiel ama, ŝi plu prenis. Tiam la ĉefbovisto interkonsiligis kun sia servantaro, kion oni faru kun la Crutscha. Unuanime ili decidis sciigi la mastron kaj lasi al li, kion li entreprenos.

Gion alvenis, sed la Crutscha faris neniun atenton al li kaj staris, kvazaŭ ŝi estus stulta. « Kion fari — mi prenas la bovinon hejmen — tie ŝi forgesos eble sian malgajecon kaj resaniĝos denove. »

Ĉio neniel helpis; hejme ŝi ree interesiĝis por nenio kaj daŭrigis la saman konduton kiel sur la alpo. La mizera besto rifuzante ĉiujn nutraĵojn tiel kadukiĝis, ke oni ne rekonis la malnovan Crutscha'n. Kion fari? Spertuloj konsilis al Gion buĉi la bovinon, kaj tio estis farata, kvankam tiun belegan beston ege domaĝis Gion kaj liaj filoj. La viandon, kiu ankoraŭ estis bona kaj bongusta, Gion regalas al la malriĉuloj, ĉar neniu el lia familio estus havinta la koron manĝi la viandon de besto tiel nobla, kia estis la Crutscha.

La kranion de la Crutscha Gion najlis al la pordo de la stalo kiel memorajon, entranĉante sub ĝi jenan surskribaĵon: « Pugnera ĝis la morto! »

(*Ci novelo aperas en la "Svisa Antologio" eldonata de Literatura Mondo, Budapeŝt.*)

El la retoromanĉa lingvo.

Tradukis:
Arthur BAUR.

DE GIAN FADRI CABERAS.

DE GUDENCH BARBIAN.

LA MATENO

*La stelvualo svenas
For de la firmamento,
L'aŭroro jam apertas
La pordojn en oriento.*

*L'arbar' kaj val' resonas
De rava melodio;
Respondas ilin eĉo:
Mirinda estas Dio!*

*Sambela kiel ĉiam
Natura reekvivas;
La homo al la tombo
Denove paŝon drivas.*

(trad. A. B.)

AL LA PATRINO LINGVO

*Vi, romanĉ-ladin' sonora,
Kara lingvo de l'patrin',
Delikata, ĉarme kora,
Kiel tre mi amas vin!*

*En la temp' de l'injaneco,
Lulis min de la patrin'
Dolĉaj sonoj en kareso,
Kantoj el la Engadin'.*

*Viaj vortoj ĉiopovaj
Velas re en la memor'
La esperojn, la malnovajn,
Naskiĝintajn en la kor'.*

*Ho! romanĉ-ladin' ŝatata,
Kara lingvo de l'patrin',
Ĉarme kora, delikata,
Kiel tre mi amas vin!*

(trad. Marcel JACCARD.)

SUPERA KURSO

LES ADJECTIFS NUMÉRAUX (NUMERALOJ)

Ils déterminent le nom en y ajoutant une idée de nombre (adjectifs numéraux cardinaux) ou de rang (adjectifs numéraux ordinaux).

1. — ADJECTIFS NUMÉRAUX CARDINAUX (BAZAJ).

L'adjectif numéral cardinal est simple de 1 à 10 et composé pour les autres nombres : unu, du, ... naŭ, dek, dek-unu. Il faut ajouter : nulo = 0 et ambaŭ = tous les deux, l'un et l'autre. Les dizaines, les centaines, les mille, les millions s'expriment par dek, cent, mil, milion précédés d'un chiffre (de 1 à 9).

Ex : 50 = kvindek ; 300 = tricent ; 7.000 = septmil ; 2.000.000 = dumilion.

123.456 se lit cent-dudek-tri mil kvarcent-kvindek-ses.

Avec les noms de nombres on forme les dérivés suivants :

Des substantifs. — En y ajoutant la finale o : unuo = une unité ; deko = une dizaine ; dek-duo = une douzaine ; miliono = un million.

Ex : Mi havas centon da pomoj (F. 14) =

J'ai cent (un cent de) pommes ;

Mi aĉetis dek-duon da kuleroj =

J'ai acheté une douzaine de cuillères.

Ainsi se traduisent les formes en "AUK" qui désignent une quantité déterminée. (E. : douzaine) ; mais si elles désignent une quantité approximative, on traduira par ĉirkaŭ = environ.

Ex. : Une centaine de francs = ĉirkaŭ cent frankoj.

Des adverbes. — En y ajoutant la finale e : unue = premièrement, d'abord ; due = deuxièmement ; deke = dixièmement ; dek-due = douzièmement.

2. — ADJECTIFS NUMÉRAUX ORDINAUX (VICMONTRAJ).

Ils se forment en ajoutant la caractéristique de l'adjectif a à l'adjectif numéral cardinal. Ils prennent la marque du pluriel et de l'accusatif.

Ex. : unua = premier ; dua = deuxième ; la unuaj homoj = les premiers êtres humains.

REMARQUE.

Pour indiquer l'ordre chronologique, les années, les siècles, les pages, les chapitres on emploie toujours la forme logique : l'adjectif numéral ordinal.

Ex. : Louis XIV vivait au XVII^e siècle = Ludoviko la XIVa (dek-kvara) vivis en la xvna (dek-sepa) jarcento.

Vous lisez le chapitre 3, à la page 3a = Vi legas la ĉapitron 3an sur la paĝo 3a.

3. — LES NOMBRES FRACTIONNAIRES (FRAKCIAJ)

Ils indiquent les fractions de l'unité. Ils se forment en ajoutant on au cardinal.

La finale o donne le substantif fractionnaire.

Ex : duono de (aŭ da) horo = une demi-heure.

La finale a donne l'adjectif fractionnaire.

Ex. : duona parto = une demi-part.

La finale e donne l'adverbe fractionnaire.

Ex : duone plena = à moitié plein.

duone fermitaj okuloj = des yeux à demi fermés.

On peut aussi employer le suffixe on sans finale.

Ex. : un trimestre = kvaronjaro ; un semestre = duonjaro.

REMARQUE.

Ne pas confondre le fractionnaire et l'ordinal.

Ex. : Unu tago estas sepono de semajno =

Un jour est le 1/7 d'une semaine.

Dimanĉo estas la sepa tago de semajno =

Dimanche est le septième jour d'une semaine.

4. — DISTRIBUTIFS (POAJ).

En grammaire, par opposition au terme "collectif", les mots qui séparent d'un tout sont dits "distributifs".

Ex. : ĉacunan est un pronom indéfini dit distributif.

Dans l'exemple : J'ai acheté pour mes enfants douze pommes et j'ai donné à chacun d'eux trois pommes, l'adjectif cardinal "trois" est dit aussi distributif. Dans ce cas l'adjectif cardinal doit être précédé de la préposition po à raison de, au taux de.

Por miaj infanoj mi aĉetis dek-du pomojn kaj al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomoj.

Selon la règle des prépositions, po est toujours suivi du nominatif.

5. — L'ÂGE (ESPRIMO DE AGO).

Pour exprimer l'âge on forme un adjectif avec le nombre cardinal en y ajoutant aĝa ou jara.

Ex. : J'ai vingt ans = Mi estas dudekajga ou Mi estas dudekjara.

Pour demander l'âge on emploie :

Kiomajga vi estas ? ou Kiomjara vi estas ?

Il y a d'autres formes : Kia estas via aĝo ? Kian aĝon vi havas ? (Z).
Kioman aĝon vi havas ? Kiom vi aĝas ?

Les réponses peuvent être tout aussi variées : Mi estas dudekjara aĝa, Mi estas en la aĝo de dudek jaroj, Mi havas dudek jarojn, Mi havas la aĝon de dudek jaroj.

Mais les formes les plus courantes sont celles citées en premier lieu.

6. — L'HEURE (ESPRIMO DE HORO).

Pour exprimer l'heure on emploie les mots suivants : sekundo = seconde ; minuto = minute ; horo = heure ; kvarono = quart ; duono = demi ; tri kvaronoj = trois quarts.

1^o Les heures.

Les heures s'expriment par l'adjectif numéral ordinal.

Ex. : Il est 4 heures = Estas la kvara.

Trois heures sonnent = La tria sonoras.

2^o Heures et minutes.

a) En indiquant d'abord les heures puis les minutes.

12 h. 10 = la dekdua kaj dek minutoj.

1 h. 1/2 = la unua kaj duono.

2 h. 3/4 = la duo kaj tri kvaronoj.

b) En indikante d'abord le nombre de minutes, avant (antaŭ) ou (post) l'heure la plus proche.

12 h. 10 = dek minutoj post la dek-dua.

3 h. moins 1/4 = kvarono antaŭ la tria.

c) En indikante d'abord les minutes ou fractions d'une heure écoulées qu'on complète par la *nouvelle heure en cours*.

9 h. 10 = dek minutoj de la deka.

2 h. 3/4 = tri kvaronoj de la tria.

Logiquement cette dernière façon est la meilleure.

Pour demander on emploie les expressions : Kioma estas la horo ? ou Kioma horo estas ?

7. — DATE (DATO).

Les dates sont généralement employées comme complément de circonstance de temps du verbe.

La précision de l'Esperanto exige que ce complément soit précédé d'une préposition (le plus souvent *en*). Il sera ainsi complément indirect.

Ex. : Le Docteur Zamenhof mourut le 14 avril 1917.

Doktoro Zamenhof mortis en la dek-kvara de aprilo 1917.

En vertu de la tolérance qui autorise à transformer le complément au nominatif (précédé d'une proposition) en complément à l'accusatif nous pourrions écrire :

Doktoro Zamenhof mortis la dek-kvaran de aprilo 1917.

REMARQUES.

1° La date figurant en haut d'une lettre est aussi complément d'un verbe, mais sous-entendu. Ex. : (tiu ĉi letero estas skribata) la 1an de marto 1939.

2° Si la date est le sujet du verbe, il ne peut être question de la transformation au cas accusatif.

Ex. : Le 15 décembre est la date anniversaire de la naissance de Zamenhof.

La dek-kvina de decembro estas la datreveno de la naskiĝo de Zamenhof.

LA LERNINTO.

NI DAŬRIGU !...

LA ABIOJ

(A. Theuriet.)

Kiam mi estis kolegiانو, okazis al mi la aventuro, kiun mi tuj rakontos.

Ni devis foje lerni odon el latinaj versoj, sed ni sciis, mia amiko Paŭlo kaj mi, eĉ ne unu vorteton de nia leciono.

— Vi restos morgaŭ en la lernejo, diris la profesoro, S-ro Dordelu, kaj vi kopios la odon dudekfoje, por meti ĝin en vian memoron !

Prave, ni ne malmeritis tion, kaj je la fino de la klaso, ni interrakordigis por peti pardonon de la profesoro. Tio mildigis lin kaj, ĉar li estis bona homo, li diris al ni, pasigante la manon en la barbo :

— Bone pripensinte ĉion, estas malsanige enkarcerigi grandajn knabojn dum tuta tago, do mi decidis malpligrandigi vian punon... Anstataŭ resti en la lernejo; vi venos kun mi, kaj helpos al mi planti en mia terspaco tri cent plantaĵojn de abio, kiuj ne povas plu atendi.

Kompreneble, ni akceptis tiun ŝanĝon kun ĝojo, kaj la morgaŭon, tagmeze, ni foriris, akompanante S-ron Dordelu.

La tereno sin etendis sur la deklivo de la plataĵo, inter la arbareto kaj la intervilaga vojo. Ĝi estis senkultura kampo, kie kelkaj betuloj kaj du aŭ tri ĉerizarboj tordis sin. Oni komprenas, ke S-ro Dordelu, praktikema homo, havis la deziron utiligi tiun nefruktodonan kampon, plantante en ĝin la solan arbospecon, kiu tie povus kreski kaj dikigi : la abio.

S-ro Dordelu, kiu estis entuziasmiĝinta pri arbokulturo, revis transformi sian terbienon en abiejon freŝan kaj verdan, kie li aŭdos pli poste la muzikon de la vento tra la branĉoj.

Li venigis el Saint-Dié tri cent junajn plantaĵojn de piceo, altajn je apenaŭ unu futo, kaj en tiu momento ili troviĝis kuŝantaj unu apud la alia en mallarga tranĉo tapetita per tero kaj musko.

Centoj da truoj estis jam horitaj en la kampo, je konvena distanco unuj de la aliaj.

— Mi estas, li diris al ni, daŭrigonta hori truojn. Vi, vi prenos la plantaĵojn unu post unu, vi enlokigos ilin, por ke ili bone staru en ĉiu truo, kiun vi ŝtopos poste per bona tero... Ĉu tio estas komprenita ? Kaj nun, ek al laboro !

Estis belela vetero printempa, nek tro varma, nek tro malvarmeta. Ĉe la rando de la arbaro, la ĉerizarboj floradis, kaj la vigla fajlado de la merloj donis al ni emon al nia laboro. Cent metrojn antaŭe, S-ro Dordelu, senjake, kapvestita per vasta ĉapelo pajla, pioĉon en mano, daŭrigadis la fosadon de siaj truoj.

Komence, tiu puno ne malplaĉis al ni. Sed, kiam ni estis plantintaj tridekon da plantaĵoj, ni ekvarmiĝis kaj eksentis lacecon.

— Diru do, ĉu tio amuzas vin ? subite demandis min Paŭlo, viŝante siajn tempiojn.

— Mi ? tute ne... mi estas mortlaca...

— Mi mortas pro soifo, kaj estas nenio por trinki, aldonis Paŭlo.

Samtempe, malica lumo pasis en siaj blujaj okuloj :

— Ĉu vi scias ? Ni devas mistifiki Dordelu'n. Ni plantu liajn abiojn, la kapo malsupren ! Tio estas bona ŝerco !

La ideo estis diable malbona. Sed kio ? La lernanto, kiel diris La Fontaine, estas malbenita gentaĉo, kaj la elpenso ŝajnis al ni admirinda. Do ni enterigis, sen la plej malgranda skrupulo, la abiojn, kun la supro malsupren, kaj la radikojn supren.

Dume, Dordelu ĉiam fosadis siajn truojn, ne suspektante nian strangan plantmanieron.

Kiam ni estis plantintaj du cent proksimume ni aŭdis sonori la kvara, ĉe la preĝejoturo de la vilaĝo. Ni iris al Dordelu al la kontraŭa rando de la tereno.

— Estis la kvara, sinjoro, sugestis Paŭlo.

— Ha, ha, diris la profesoro, ĉu ĉio estas plantita ?

— Preskaŭ ĉio, sinjoro.

Dordelu sin turnis al la plantejo kaj observis la kampon. Feliĉe, li estis miopulo ; li malprecize vidis vicojn de arbustoj, kaj ne pli bone rigardante :

— Nu, li diris, vi bone laboris ; vi povas foriri, sinjoroj.

Ni ne atendis pliajn vortojn kaj forkuris rapide.

Sed, la sekvantan tagon, necesis reaperi en la gimnazon. La nokto estis kvietiginta eksciton, kaj ni estis sufiĉe maltrauvilaj.

Kiam ni eniris en la klason, Dordelu jam estis en sia katedro. Li vidis nin preni lokon kaj nenion diris.

— Eble li nenion rimarkis, flustris Paŭlo.

Dum la tuta leciono, la profesoro, sen la plej malgranda flankdiraĵo, plenumis la klarigadon de la aŭtoro; sed kiam la deka sonis, kaj en la momento kiam ni estis elirontaj:

— Sinjoroj Paŭlo kaj Andreo, li diris, restu, mi havas ion por diri al vi.

Ni obeis, jetante reciproke al ni angoran rigardon.

Dordelu surmetis la ĉapelon, malsupreniris de la katedro, kaj nin kaptante per unu mano:

— Bubaĉoj! li grumbliis, ni iru, se plaĉas al vi, supren ĝis mia tereno!

Ne maltenante nin, kaj ne dirante plian vorton, li tiris nin eksteren.

Ni alvenis al la tereno, kaj Dordelu trenis nin kolere antaŭ la plantojon. Tiu kontraŭstarigo kun la materia pruvo havis nenion ĝojigan. Sur la griza kampo, la du cent abioj faris malĝojan mienon kun la radiokoj supren.

— Jen via laboro, sentaŭguloj, ekkriis Dordelu.

Poste, kun grava kaj profunda konvinkita tono, li pludiris:

— Sinjoroj, vi devus havi la respekton al la arboj. Ĉu vi scias, kio estas arboj? Ili estas vivantaj estaĵoj, kiel vi kaj mi. Ili estas la ĝojo de la tero, al kiu ili donas la akvon de la fontoj, kiuj ĝin akvumas, kaj la humon, kiu ĝin fekundigas; ili estas la saneco de la aĉero, kiun ilia verdaĵo purigas... Bela arbo, ĝi estas festo por la okuloj, kaj miloj da arboj, tio faras la arbaron. Tiu riĉeco de nacio! Lando, kiu ne havas plu arbaron estas ruinigita lando. Tiu, kiu plantas arbon estas bonfaranto de la homaro; tiu, kiu detruas unu nenecese estas krimulo. Kaj nun, juĝu vin vi mem! Post dudek jaroj, tiuj du cent plantaĵoj, kiujn vi mortigis, estus grandaj kaj belaj; ili estus estintaj la ĝojo de tiu senfrukta kampo; ili estus donintaj servojn al niaj infanoj kaj al ni mem... Pri-pensu tion!... Tio estos via puno... Nun, iru!

Mi ne scias, kiel efikis tiu admono sur mia kamarado; rilate al mi, ĝi profunde tuŝis min, kaj de tiam, mi havis la respekton al la arboj.

Trudukis: ADĖ.

...

Venos epoko

« Venos epoko kiam mitrali, mortigi alilandajn homojn,
« kantante naciajn himnojn, ŝajnos tiel abomeninda kiel, nun,
« tempe ŝajnas al ni esti brulingintaj heredulojn, kantante reli-
« giajn himnojn. »

(Pierre Hamp.)

Kiu do, hodiaŭ, volus provi pravigi tiujn teruregajn religiajn agmanierojn. Mi neniu kulpigis, nek personojn, nek partiojn; ili kredis bone fari, la malfeliĉuloj!

Tamen la tolerema spirito progresigas pri religiaj ideoj. Antaŭ ol esti katolikoj, protestantoj, judoj, mahometanoj eĉ liberaj pensuloj, ni estas homoj. Same antaŭ ol esti francoj, germanoj, angloj, italoj, hispanoj.

Tute nature estas ke ni ŝatu nian patrujon antaŭ alilandajn, ke ni

juĝu preferindaj la doktrinojn religiajn aŭ filozofiajn de ni elektitajn, kiel ni amas niajn gepatrojn pli bone ol la aliajn homojn.

Sed malestimi, eĉ abomeni la aliajn tio ne estas inda je homo. Kaj agi kontraŭ ili kiel lupoj, per ĉiuj karakteroj de krueleco, surprizo, embusko, per ĉiuj potencaj rimedoj kiujn disponigas al ni la scienco, malpli estimigas la homojn kaj vicigas ilin sub la rabaj bestoj.

La esperantistoj, kiuj esence havas altruisman, internacian, grandaniman spiriton, speciale suferas pro tiuj kruelecoj; kaj pli kaj pli estas decidemaj disvastigi siajn noblajn ideojn pere de sia lingvo.

H. DESMAREST.

TRA LA GRUPOJ

AMIENS

Nova kurso: ĉiumerkrede je 20 h. 30 en la turbodomo, laŭ speciala kurso "L'Esperanto Intégré" de S-ro Moitié.

HONORA DISTINGAJO. — En tête de la promotion violette on relève avec plaisir le nom de M^{me} Alice Colléatte, présidente du Groupe Espérantiste d'Amiens, qui vient d'être promue au rang d'Officier de l'Instruction Publique, Le Comité Fédéral et tous les Espérantistes du Nord de la France félicitent chaleureusement M^{me} Colléatte.

EDZIGO. — La 30an de februaro, F-ino Suzanne Rêthoré edzinigis al S-ro Marcel Descamps. Niajn tutkorajn bondezirojn por plena feliĉo.

ARRAS

Mardon 17an de januaro, S-ino Haudebime faris tre interesan paroladon pri Svedujo. Ŝi montris belan kolekton de kliŝoj kaj ŝi renkontis grandan sukceson. La ĉeestantoj avide deziras similajn vesperojn.

SUKCESOJ EN LA LERNEJOJ. — Dank'al ŝia bonega iniciativo, S-ino de Warlincourt komencas novan esperanton kurson en sia klaso. Ŝi estas instruistino en porknabina lernejo; la lecionoj okazas ĉiusabate posttagmeze dum "loisirs dirigés". 42 lernantinoj 12-jaraj lernas laŭ amuza maniero la esperantan lingvon.

Alia grupano, S-ro Léon Roger (kiu lastan jaron gajnis la 1an premion en Fervorigilo) estas instruisto en Beaurains, je 3 km. for de Arras. Ankaŭ li planas kurson por la tieaj geknaboj. Sed ĉar lia lernejdirektoro estas al ni favora eble okazos ankaŭ kurso por plenaĝuloj.

M. Martin, directeur du cours complémentaire à Bapaume fait également un cours d'Esperanto à ses élèves pendant les loisirs dirigés.

Post la fino de la rekt-metoda kurso en la lernejo rue de Saint-Quentin, 20 ĝelernantoj perfektigas per Cours Pratique. La kursoj en la Komerca Ĉambro ĉiam regule okazas.

BOULOGNE-SUR-MER

FESTO. — En la salono "Meurice" okazis la 23 an de januaro sukcesplena festeto, partoprenis ĝin proksimume 30 personoj.

KURSO. — La grupo malfermis kurson sekvata de dek kvin ĝelernantoj el kiuj estas 12 ĝelernantoj.

NEKROLOGO. — En januaro mortis Sinjoro Barthelemy eksprezidanto de nia grupo.

La 3an de februaro mortis en Gamaches (Somme) en ago de 76 jaroj :

Sinjoro Maurice Duchochois.

Unu el la plej malnovaj, plej spertaj sinjoroj forlasis nin. Aktivulo jam antaŭmilite, li partoprenis al la unua Kongreso. Malavare li oferis por la movado, liaj konsiloj ĉiam estis tiuj de spertulo, por ni lia morto signifas gravan, dolorigan perdon. Liaj amikoj akompanis lin al la tombejo (en Boulogne-sur-Mer) kie antaŭ ol fermi ties tombon, Sinjoroj Le Petit kaj Deligny per kortuŝaj vortoj adiaŭis lin.

Ni esprimas ĉi-tie al liaj edzino kaj infanoj la plej profundaj sentojn de ĉagrena simpatio.

BOURBOURG kaj BERGUES

Daŭrigo de la perfektigaj kursoj.

BOUSSOIS-RECQUIGNIES

La 6an de februaro, geedziĝis S-ro Bertaux, sekretario de la Grupo, kun F-ino Obled, nia samideanino ankaŭ. Korajn bondezirojn.

Oficiale la Grupo estas nomata "Monda Voĉo". La kurso funkcias regule, ĉiuvendrede 40 gelnantoj ĉeestas en la kurso.

BRUAY

La Grupo iam bone prosperas. Sub gvidado de Samideanoj Bialasik kaj Flaczynski okazis, fine de decembro "Atesto pri Lernado". Ok gelnantoj akiris la diplomon. Estas : F-inoj M. Goulliart, E. Lemoine ; S-inoj M. Lemoine, L. Louvion, F. Guillemant ; S-roj E. Hubert, O. Penet kaj L. Tirman (el Béthune).

DESVRES

Dum la antaŭaj jaroj, ekzistis en Desvres nur grupo de lernantoj. En la komenco de januaro fondiĝis grupo de plenkreskuloj, kies estraro estas :

Prezidanto : S-ro Dumarquez, lernejestro ; vicprezidantino : S-ino Pacquentin ; sekretario : S-ro Demulder, profesoro ĉe la kompl. kurso ; kasisto : S-ro Pruvost, oficisto.

La kunvenoj okazos merkrede, je la 20 a, dufoje monate.

La 16an de januaro okazis prelego de S-ino Haudebine, kun lumbildoj, pri Svedujo. 60 ĉeestantoj.

La 15-an de februaro, S-ro Stuit faris interparoladon kun la lernantoj de la kompletiga kurso.

DUNKERQUE

Dimanĉe 12an de februaro, en la Urbodomo, interesplena parolado de S-roj Guillaume, Petit kaj Mahé kun belaj kantoj de Marga Rineta akompanata de S-ano Macke per akordeono.

Kontentige daŭras la jenaj kursoj : sabate por komencantoj ; ven-

drede por progresintoj ; marde revizio kaj konversacioj por ĉiuj en la Urbodomo de la 18,15 aŭ 18,30 ĝis la 20a.

Komence de junio okazos la oficialaj ekzamenoj.

La 1a de julio granda festo en la Urbodomo de Malo.

Meze de junio granda ekskurso.

La 14an de marto nia grupo okazigis sian ĝeneralon kunvenon ĉiujaran. Malferminde la kunsidon S-ro Degand, nia prezidanto, raportis pri la movado dum la pasinta jaro. Li konstatas ke nia idealo ne nur progresis en Eŭropo sek ankaŭ en Suda Ameriko kaj precipe en Brazilio.

Estis akceptataj kiel novaj membroj 24 novaj samideanoj.

Poste oni reelektis la trionon de la Komitato. Estis elektitaj : S-roj Degand, Houzé, S-ino Vanhersecke, S-roj Dorp, Oustland, Cléty, Nogé N., Senouque, Piéters, Carron.

NASKIGO. — Ni sciigas pri la naskiĝo de Claude-Gérard Dejangs, filo de niaj simpatiaj gegrupanoj. Gratulojn al la feliĉaj gepatroj kaj bonvenon al la nova naskito.

KOLOMBAJOJ. — Ni ĝoje sciigas la fianĉigon de nia amiko Marcel Delcourt (doktoro dum liaj liberaj horoj), nune en Parizo, kun ĉarmo-plena fraŭlino Marguerite Ducrocq.

Ankoraŭ fianĉigon ni devas sciigi ; ĝi estas tiu de nia estimata samgrupano Robert Le Moine kun fraŭlino Lecocq.

El korajn gratulojn al tiuj kvar feliĉaj homoj !

FRESNES-VIEUX-CONDÉ

La Grupo aktive preparas la Federacian Kongreson kiu okazos la 6an kaj 7an de majo. La propagando bone funkcias. En Fresnes, du kursoj okazas ĉiunmerkrede en la Urbodomo kaj ĉiujnarde en Vieux-Condé. S-ro Zeller, profesoro ĉe la gimnazio de Condé instruas nian lingvon al 15 lernantoj ĉiusabate. Baldaŭ sama kurso funkcios ĉe la knaba lernejo en Fresnes.

E. N.

HAZEBROUCK

La 3 ĉefaj instingantoj (geinstruistoj) en tiu urbo estis senditaj en diversajn lokojn. Tamen S-ro Deveyer instruis ĉe Ajistoj. La grupo oficiale enskribiĝis al la Federacio.

LIEVIN

FUNEBO. — Malbona sciigo alvenis la 22an de januaro : F-ino de Bloch, 21a jara, el Liévin, mortis post kruela malsano. Ŝi estis tre fervora al nia movado, bonega esperantistino kiu ŝatis partopreni ĉiujn niajn festojn. Niajn plej sincerajn kondolencojn al ŝia familio.

LENS

Le Comité du groupe espérantiste "Zamenhof" s'est réuni le 13 février. M. Eugène Dubois, président, ayant démissionné, le comité a procédé à l'élection d'un nouveau président. A l'unanimité, M^{lle} Yvonne Pocquet a été élue.

Le comité invite au cours supérieur les espérantistes ayant suivi le cours élémentaire. Ce cours supérieur est fait par M. Erjavec et a lieu à 19 h. 30 tous les mardis et vendredis à l'école Carnot.

La Esperanto-Balo, la 28an de januaro bona sukcesis.

Komenciĝos nova elementa kurso gvidota de F-ino Y. Pocquet.

R. E.

LILLERS

Notre toujours dévoué Flaczinski a dirigé avec talent un cours de perfectionnement à Lillers. Les résultats en sont excellents : il nous annonce 7 de ses élèves candidats au Kapableco ! Bravo nia kara Flaczinski, kaj bonajn dezirojn al la Grupo de Lillers !

LILLE

Sabato, 1an de aprilo (15 h. ĝis 16 h.) S-ro Volqueman prezentos Esperanton antaŭ la mikrofono de Lille-P.T.T.-Nord, dum la lernejaradio, pere de "sketch" aranĝita de li mem kaj legata de 2 el siaj lernejoj knaboj. La afero, kiu aperas nova, tre plaĉos a la geinstruistoj esperantistaj kaj ankaŭ al la esperantistaro kiu povos ĝin aŭdi. En la sama dissendo la fernantoj kantas, tutesperante, belan, gajeman kanteton (angla marŝuro) kiu certe plaĉos.

MALO-LES-BAINS

Regule ĉiuvendrede, 18,30 ĝis 20a, perfektiga kurso en la Urba Biblioteko, rue Clemenceau.

PONT-SUR-SAMBRE

Un groupe à citer en exemple ! Voyez plutôt : *Population* de la commune : 1.970 habitants. — *Date de création* du Groupe "Fraterco" : 1935. — *Effectif* : 25 membres. — *Résultats* : 2 fois "Fervorigilo" (1936 et 1937) 2 fois "Coupe Boyer" (1937 et 1938), 3 Atestoj pri Kapableco en 1938. — *Président* : M. Broutin ; secrétaire et trésorier : M. Buronfosse.

Bal du 14 janvier. — Bal de nuit admirablement organisé grâce à l'actif et dévoué secrétaire Marcel Buronfosse et au concours enthousiaste de tous les membres du Groupe. Salle décorée avec goût : étendards, étoiles, inscriptions portant des appréciations d'hommes de valeur sur l'Esperanto, exposition de correspondances (cartes postales) très appréciée, souscription pour la paix par l'Esperanto avec agrandissement du dessin de Flick « Vois-tu Fiston... ». La souscription a rapporté environ 170 fr. Bar, buffet, champagne, "Lambeth Walk !!", 2 orchestres. Animation folle !

Environ 4 à 500 personnes dans la nouvelle salle de la Mairie. Courte causerie du Président (20 minutes) sur l'Esperanto, son créateur, son idéal, l'Esperanto et la Paix, l'Esperanto et l'Avenir. Remerciements aux groupes voisins qui s'étaient fait représenter : Avesnes-sur-Helpe, Jeumont, Marpent, Aulnoy. Ensuite l'Espero chantée par toute l'assistance. Remarqué la présence de M. et M^{me} Couteaux, président du Tribunal civil d'Avesnes, du groupe d'Avesnes, M. et M^{me} Rampanaux, du groupe de Jeumont, de M. Thomas, député de la circonscription, du Groupe *Espérantiste de la Chambre des Députés*. Clôture à 4 heures du matin !

M. Broutin nous a confié que c'était là « sa plus belle joie de sa carrière d'Espérantiste ». Toutes nos félicitations à nos amis de Pont-sur-Sambre qui se dévouent avec une telle ferveur à la propagande de l'Esperanto.

PONT-DE-BRIQUES.

Notre cours connaît toujours le même succès et les élèves sont aussi assidus qu'au premier jour. Nous continuons à enregistrer de nouvelles adhésions et le nombre des élèves se chiffre actuellement à 35.

Ce cours a lieu le samedi de 20 heures à 21 h. 30 dans une salle de la Mairie. Nous employons pour ce cours la méthode Szilagyí.

R. C.

ROSENDAEL

En la Urbodomo de Rosendaël sukcesplena kunveno okazis la de februaro, sub prezido de S-ro Urbestro Machy. Proksimume 250 personoj aŭskultis la propagand-paroladojn de la vojaĝanta "Ekipo" de la S.F.P.E.

S-ro Guillaume parolis pri la disvolviĝo de Esperanto en Francujo. S-ro Petit, pri la utileco de Esperanto. Poste estis prezentata la filmo "Antaŭen" kiu multe plaĉis al la ĉeestantoj ; kaj per sia agrabla voĉo S-ino Marga Rineta aŭdigis kelkajn ĉarmajn kantojn, akompanata per piano de S-ino Hespel.

Jam kurso funkcias perfekte sub la gvidado de nia amiko Lasuye ; ĝi estas sekvata de ĉiunmerkrede de 30 entuziasmaj plenaĝaj personoj inter kiuj dekduo da geinstruistoj, 5 soldatoj kaj pluraj oficistoj.

SAINT-OMER

Kurso regule okazas ĉiunlunde je 19 h. 15 ; profesoroj : S-roj Bernard kaj Deligny. La unuan (1-an) lundon de ĉiu monato interparola kunveno sub gvidado de S-ro Deligny. Ĉiuj kunvenoj en la Komerca Ĉambro.

VALENCIENNES

Post dormado tro longa, la Grupo vekigas, S-ro Dumont sekretario, anoncas ke li aranĝas kunvenojn. S-ro Centnerŝver refaros la kursojn kaj S-ro Lefevre, profesoro, ĵus finas kurson en la Liceo. Tiuj 3 bonaj samideanoj donos al ni baldaŭe potencon Grupon.

VALENCIENNES-a REGIONO

Esperanto-Klubo. Tiu Grupo bone funkcias en : Bruay-Thiers, Onaing kaj Raismes sub la gvidado de S-ro Huin. La 26an de marto okazos en Raismes Esperantista Balo.

G. B.

En la Federacio**FEDERACIAJ KOMITATAJ KUNVENOJ**

La komitato kunvenis en Arras la 18an de decembro 1938, sub prezido de S-ro Degand.

S-ro Degand legas klarigan kaj kortuŝan leteron de nia sekretario, J. Centnerŝver kiu bedaŭre ne plu povas okupiĝi pri tiu ofico, kiun li tiel bone kaj ageme plenumis. Pro la urĝeco de anstataŭigo, la prezidanto proponas S-ron Brunet, el Arras, kiel novan sekretario. Do ĝis la Kongreso, kie la afero estos reguligita, S-ro Brunet akceptis kun elekto de S-ro Stuit (Arras) kiel helpsekretario. La tuta komitato sendas siajn plej korajn dankojn al amiko Centnerŝver por la granda laboro dum longaj jaroj, de li farita. De nun la Grupoj sendu siajn leterojn al :

P. Brunet, 7, rue Saint-Michel, Arras (P.-de-C.)

La komitato kunvenis en Douai la 26an de Marto, S-ro Dumarquez (Desvres) Vicprezidanto, ĝin prezidis. Diversaj demandoj estis pridisku-

tataj. La federacia kasisto, S-ro Warusfel sciigas ke 14 grupoj kaj 4 izoluloj sendis sian kotizon 1939an. Tio donas ĉirkaŭ 450 membrojn. La aliaj grupoj estas petataj sendi tuj sian aliĝon. La Grupo de Jeumont donacas 100 frankojn por la federacia Kaso. Tuj "anonimulo" tre konata (el Lens) donacas 50 frankojn por *NJE*.

La ĉeestantoj aprobas la Kongres-programon el Fresnes. Dum la kongreso kaj laŭstatute estos balotitaj kaj elektitaj por 2 jaroj niaj sekretarioj : ĝenerala sekretario kaj la sekretarioj por radio, gazetaro, izoluloj. Kandidatoj sendu tuj sian kandidatecon.

Komitata kunveno okazos en Dunkerque la 2an de julio dum la esperanta ferio organizita de la loka Grupo. Detaloj alvenos rekte el Dunkerque en ĝusta tempo.

INTER NI

a) Ĉu vi sendis vian aliĝon al nia Kongreso ? Rapidu !

b) Ĉu vi, grupsekretario sendis la kotizojn de via societo al S-ro Warusfel, nia federacia kasisto ?

c) En ĉiu grupo devas troviĝi *almenaŭ* 20 abonantoj al via revuo : *Nordfranca Esperantisto*.

d) Ĉu vi, izolulo-abonanto estas efektiva membro de nia federacio ? Memoru ke vi devas doni vivosigno al via sekretario : P. Brunet, 7, rue Saint-Michel, à Arras.

BOUSSOIS-REQUIGNIES. — Sekretario de la nova Grupo : S-ro André Bertot, instituteur, Grande-Rue à Boussois (Nord).

PONT-DE-BRIQUES. — S-ro Maurice Chivot, 73, avenue de Paris à Boulogne-sur-Mer, okupiĝas pri tiu nova Grupo.

FOUQUIÈRES-LEZ-LENS. — S-ro A. Posière, instruisto en Fouquières instruas tie. Inter liaj lernantoj troviĝas 8 gekolegoj. S-ro Posière firme celas krei grupon.

TOURCOING. — S-ro Simoens faras tie regulajn kunvenojn kun 18 ĉeestantoj.

Gratulojn al tiuj fervoraj amikoj kiuj baldaŭ pligrandigos nian familion.

VIVO DE LA GRUPOJ. — Ĉiuj Grupoj bonvolu sendi sian monatan resumon en du ekzempleroj al S-ro Vernay, 18, rue Albert-1^{er} en Dunkerque kiu transdonos unu al S-ro Degand.

RADIO. — Granda urĝeco : Ĉiuj skribu al la radio stacio : Paris P.T.T., 107, rue de Grenelle, à Paris ; Radio P.T.T.-Nord, boulevard de la Liberté, à Lille.

LIBROJ. — Esperantaj libroj estas presitaj en la tuta mondo. Ofte grupo aŭ esperantistoj dezirus havi ilin sed kien sin turni ? S-ro Stuit (adreso : Esperanto-Arras) plenumos tuj vian deziron je la plej favoraj kondiĉoj. Ili malpli elspezos kaj se restas profiteto, ĝi iros en la federacian kason.



S-ro PIERRE PETIT,

le dévoué Secrétaire Permanent de la S.F.P.E.

Nekrologo

Maurice DUCHOCHOIS

La trian de februaro mortis samideano S-ro Maurice Duchochois en Gamaches (Somme) en kiu regiono li de post cirkaŭe du jaroj li loĝis.

La sano de S-ino Duchochois kaj aliaj konsideraĵoj pri lia familio devigis lin forlasis lian tiel multe amatan kaj malnovan urbon Boulogne.

Estus tro longa priskribi detale la esperantistan agemon de Duchochois, tial ke li fakte dediĉis al la kaŭzo la duan parton de sia vivo (Li estis 77 jara). Sed ĉu estas necese longe paroli pri tiu bona pioniro kiam la Norda Federacio kaj la abonantoj de *Nord-Franca Esperantisto* estas bone lernigintaj pri liaj apostolaj kvalitoj ?

Tre malmulte post la mirinda propagando de Michaux por la enkonduko de Esperanto en norda Francujo kaj aliaj proksimaj landoj, Duchochois aliĝis al la movado kaj helpis ĝin por la organizado de la unua kongreso en Boulogne.

Tre aktiva kaj sindonema laŭnature, Duchochois en pluraj okazoj vidis klare la veran kaj taŭgan celon por la propagando. En 1930, li vidis la eblon restarigi la Boulogne'an grupon kiu ne estis tute morta, sed ne plu kunigis. Li kolektis, kunvenigis kaj reaktivigis la malnovajn pionirojn kiuj ne plu multe fidis je la rezultato de la sankta signo, kaj samtempe li turnis sin al la juneco kaj sukcesis konvinkante ĝin per sia persisteco. La verko de Michaux ne estis tute perdata kaj, dank'al Duchochois la Boulogne'a grupo rebriligis de kelkaj belaj lunoj, kiujn la nuna komitato ne intencas forlasi spite la nesufiĉanta helpo de sia urba estraro.

Dank'al Duchochois, la fako pri instruado en Boulogne estas bonega. Li sukcesis per sia takta lerteco kaj obstineco enkonduki esperantistajn kursojn en diversaj lernejoj menciinde en la "Supera komerca Lernejo por fraŭlinoj" kies kursojn lia posteulo, helpata de sindonemaj anoj, daŭrigas.

En Gamaches, Duchochois kunportis sian prozelitan spriton kaj fine sukcesis starigi, en tiu urbeto, esperantistan grupon. Ni esperu ke la varbitaj anoj ne malkuraĝigos kaj daŭrigos tiel bone komencitan ekmovon.

Ironio de la sorto ! Estas kiam mi skribis al Duchochois por havigi kelkajn detalojn pri lia vivo por aperigi en *Nordfranca Esperantisto* ke li malsaniĝis severe. Li nur povis respondi el sia lito ke li estis devigata ripozi longe pro resaniĝo. Ho ve ! lia fina horo estis skribata. Li mortis post kelkaj semajnoj... La Esperantistaro lin ne forgesos.

M. LE PETIT.

Madame Maurice DUCHOCHOIS ;
Monsieur et Madame Arthur SENE-DUCHOCHOIS ;
Monsieur et Madame Pierre DEVILLEPOIX-SENE ;
Messieurs Jacques et Edouard DEVILLEPOIX ;
Madame Louis DUCHOCHOIS ;
Monsieur et Madame Louis DUCHOCHOIS et leur fils ;
Madame Suzanne DUCHOCHOIS, en religion Sœur Marie-Saint-Jean
de la Croix, Carmélite ;
Mesdemoiselles Marie-Thérèse et Yvonne DUCHOCHOIS ;
Les familles QUINSAC, DESME, FOURNIER, VERMESCH, GUERY,
PANCIER, PIETTRE, HAMEREL, LE MERCIER et VIDOR

Ont la douleur de vous faire part de la perte cruelle qu'ils viennent
d'éprouver en la personne de

Monsieur Maurice-Louis-Charles DUCHOCHOIS

*Ancien Directeur des Glacières Boulonnaises
Ancien Juge près du Tribunal de Commerce de Boulogne
Président d'honneur des Groupes Espérantistes de Gamaches
et Boulogne*

leur époux, père, beau-père, grand-père, arrière-grand-père, beau-frère,
oncle, grand-oncle et cousin, pieusement décédé en son domicile, 2,
Grande-Rue, à Gamaches (Somme) le vendredi 3 février 1939, dans sa
77^e année, administré des Sacrements de l'Eglise.

Une présentation du corps aura lieu en l'église Saint-Pierre et
Saint-Paul de Gamaches, le lundi 6 courant à 14 heures 30.

Le service funèbre sera célébré le Mardi 7 courant, à 9 heures 30,
en l'église Saint-Vincent-de-Paul (Capécure) à Boulogne-sur-Mer, suivi
de l'inhumation au cimetière de l'Est, dans le caveau de famille.

Réunion à l'église à 9 heures 15.

Il ne sera pas envoyé de faire-part, le présent avis en tenant lieu.

Geesperantistoj

La konataj okazintaĵoj de la lasta tempo kaŭzis, ke denove nia Movado perdis en kelkaj landoj kaj regionoj amason da bonaj, fervoraj kaj agemaj adeptoj kaj laborantoj por la ideo de la internacia lingvo. Tiun ĉi pli ol dolorigan faktan ni bedaŭrinde ne povas ŝanĝi, ĉar ĝi superas niajn fortojn kaj troviĝas ekster nia povo.

Tamen, ĝuste tial, estas urĝe necese, ke ni ĉiuj ekagu ankoraŭ pli intense, energie, oferece kaj unuece en tiuj landoj, kie ni havas plenan aŭ almenaŭ partan agadliberecon. Tion ĉi postulas de ni ne nur la intereso de la Esperantismo, sed ankaŭ la kulturo kaj progreso de la tuta homara socio, al kiu ni deziras helpi pere de la internacia lingvo.

Kvankam en la privata vivo ĉiu el ni havas sian propran opinion pri la solvmaniero de la gravaj demandoj kaj problemoj, premantaj la hodiaŭon, kvankam ĉiu el ni havas siajn proprajn mondrigardon kaj ideologion, kaj eĉ rilate al la socia rolo de la internacia lingvo niaj opinioj kelkfoje eble malsamas, tamen ni ĉiuj havas unu tre fortan deziron kaj unu grandan celon,

La progreson kaj finan venkon de Esperanto

Ne ekzistas, do malhelpo, ke surbaze de tiu ĉi celo ni ĉiuj komune kaj amike kunlaboru por atingi ĝin kiom eble plej baldaŭ. Tial ni turnas nin al vi ge-Esperantistoj tra la tuta mondo :

Subtenu viajn Esperantistajn organizaĵojn, viajn klubojn kaj societojn, viajn landajn kaj fakajn asociojn. Aparte subtenu la plej grandan kaj plej fortan, vian kaj nian.

Internacian Esperanto-Ligon

Gia neŭtraleco ebligas al ĉiu membriĝi.

Gia demokrateco garantias al ĉiu plene libere esprimi sian opinion kaj tiamaniere influ la gvidadon de la Movado.

Giaj taskoj kaj celo estas samtempe ankaŭ viaj.

Aliĝu, do, multnombre, ĉiuj senescepte, al ĝi, ĉar I.E.L. bezonas vin kaj vian moralan helpon precipe en la hodiaŭa kriza kaj malluma epoko. Memoru bone, ke subtenante I.E.L. on, vi subtenas la Movadon kaj progresigas la Esperantismon.

Eble vi ne povos rimarki tujan rezulton de via subteno, sed estu certaj, ke via laboro pli aŭ malpli frue donos bonajn fruktojn, ĉar post la malluma nokto devas sekvi ankaŭ hela tago.

Optimisme kaj kuraĝe antaŭen !

Unueco estas forto !

Por la Internacia Esperanto-Ligo :

Prezidanto : *Int-Generalo L. Bastien, Paris;*

Vicprezidanto : *E. Malmgren, Stockholm;*

Estraranoj : *D-ro P. Kempeneers, Bruxelles; D-ro I. Lapenna, Zagreb; A. C. Oliver, London.*



La fama "Ekipo" de propagando de S.F.P.E. :

F-inoj PAULIER kaj KALNINE, S-ro P. PETIT, S-ino MARCA BINETA.

S-roj GUILLAUME kaj MAHE.